

# Terminara Kuriero

TeKu 137

Septembro 2009

## Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagtstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

### Karaj gekolegoj,

bonvolu pardoni, ke ĉi tiu kuriero aperas tiom malfrue. Post la kongreso mi volis nepre informi vin pri ebloj havigi komputilan version de nia fervoja terminaro aktualigita laŭ niaj lastjardekapaj decidoj. Por tiu informo necesis scio pri sukceso de koncerna teknika provo ĉe kelkaj kunlaborantoj. Sed la nunjara „somera truo” estis kvazaŭ abismo kaŭzanta silentadon. Post nur du sukces-anoncoj mi nun povas diri jenon:

### Kiel havigi aktualan staton de nia terminaro?

Post pli ol jardekon daŭra tradukado de difintekstoj kaj pripensado de plej taŭgaj terminoj, nun urĝas ebligi disponon pri aktuala stato de nia fervoja terminaro al niaj kunlaborantoj, prelegontoj, verkontoj de fakaj artikoloj kaj ankaŭ aliaj interesatoj. Tiu aktualigo nun ampleksas ĉirkaŭ 600 Esperanto-terminŝanĝojn, 241 novajn nociojn (numeroj 12690 – 13000) kaj 473 enigitajn Esperanto-difinojn.

**Antaŭkondiĉo** estas komputilo kun *CD-ROM*-drajvo, *USB*-ŝtopilingo kaj mastruma programo *Windows95* aŭ pli nova versio, kun farita instalado de *CD-ROM*-disko *RailLexic3.0* de 2001/2002.



Unika kombinaĵo de tramvojo kaj funikularo en *Trieste*

Se vi ĝis nun **ne havas** *CD-ROM*-diskon *RailLexic3.0*, petu min sendi ĝin ludone al vi. Necesas spaco por 200 megabajtoj (MB) en via komputilo.

Por **aktualigo** necesas anstataŭigi la originan dosierujon „*Database*” de 2001/2002 per la nova de 2009, kiun mi havas. Unuaj spertoj montris, ke malgranda enŝovebla *USB*-datumportileto (ankaŭ tielnomata „*USB*-ŝlosilo”) kun 1 gigabajto (GB) da spaco (kostas en Germanio ĉirkaŭ 10 €) estas taŭga solvo por transporti grandajn dosierojn – pli bona ol longdaŭra sendo per retroŝta aldonajo. Do:

1. Vi sendu *USB*-datumportileton per normala poŝto – por sekureco prefere en registrenda letero – al mi.

2. Mi kopios mian aktualan dosierujon „*Database*” sur vian *USB*-datumportileton kaj sendos ĝin reen al vi.

3. Sub <c:\RailLexicV3> vi forigu la originan dosierujon „*Database*” kaj kopiu la novan dosierujon de la *USB*-datumportileto al <c:\RailLexicV3>.

### Mi tre rekomendas uzi ĉi tiun oferton!

Koncerne **libroforman** aktualigon, kolego *István Gulyás* planas serion da kelkaj dulingvaj terminaroj. Ili kompreneble ne enhavas difinojn.

### Kongresrezultoj en *Trieste*

Dum la kunsidoj estis detale traktataj nocioj laŭ TeKu 134, 135 kaj 136, sekve decidataj jenaj terminoj:

00076	<b>bremsotubplenigo rapida</b>
00454 / 08824	<b>ĉasiostego</b>
02450	<b>plenigogrado</b>
02695	<b>radodiametro reltuŝa</b>
03822	<b>flukso devojiĝa</b>
05241	<b>cisternlokomotivo (sen aparta tendro); lokomotivo [cistern-] (sen aparta tendro)</b>
05242	<b>tendrotrena lokomotivo; lokomotivo tendrotrena</b>
10341	<b>kateneria sistemalto</b>
11478	<b>rapidoregado</b>
12740	<b>bariero tutbara</b>
12750	<b>trakanteno „balizo”</b>
12751	<b>trakanteno pasiva</b>
12752	<b>trakanteno aktiva</b>

Pri 01926 (TeKu 136, paĝo 3) la partoprenintoj opiniis, ke la *UIC*-difino tradukita el la germana, ne sufiĉe klarigas la karakterizaĵojn. Estis decidataj jenaj esploroj:

- Franca kolego traduku la franclingvan *UIC*-difinon por komparo kun la germanlingva.
- La sekretario traduku koncernan klarigon en la germana *Transpress-Leksikono de Fervojo*.

La franclingvan *UIC*-difinon tradukis *Marc Noulin*. La sekva teksto prezentas  
 - per malgrandaj literoj (grando 8) la sole germanlingvajn karakterizaĵojn,  
 - per *kursivaj* literoj la sole franclingvajn karakterizaĵojn:

Seninterrompa premaer-konduktotubo de *aŭtomata* dukondukila bremsa,  
 - ligita kun ĉefaerujo *de la lokomotivo* sub daŭre alta premo,  
 - kontinua repleniganta helpaerujojn de vagonoj, *por redukti loziĝdaŭron*,  
*precipe ĉe longaj kaj pezaj vagonaroj*, kaj ankaŭ *provizi* specialajn  
*pneŭmatikajn* instalaĵojn, ekzemple elektromagnetan relefikan bremsan aŭ  
 pordofermilojn.

La klarigo en la *Transpress*-Leksikono tekstas simile:

Suplementa premaer-konduktotubo de dukondukila bremsa,  
 - por rapida replenigo, precipe ĉe longaj kaj pezaj vagonaroj, ĉe trajnoj kun  
 mallonga loziĝdaŭro kaj ĉe trajnoj kun stirvagono sen propra premaer-  
 generilo,  
 - por sekurigi neelĉerpeblecon de bremsa, kaj  
 - por provizi elektromagnetan relefikan bremsan ĉe pasaĝervagonoj,  
 pordofermilojn kaj eventuale aliajn premaer-konsumantojn.

## Kelkaj novaj taskoj

**01926** Laŭ supraj klarigoj jen 2 terminproponoj:

- 1) **konduktotubo de dukondukila bremsa**
- 2) **konduktotubo bremsaera suplementa**

La sekva grupo de 5 nocioj temas pri nesufiĉa adhero inter rado kaj relo. Tiukaze eblas du fenomenoj:

- I. Ĉe propulsataj radoj (trakciradoj) la trapasata vojo dum unu revoluo estas malpli longa ol la radperiferio.
- II. Ĉe bremsataj radoj la trapasata vojo dum unu revoluo estas pli longa ol la radperiferio.

La nocioj 11895 a) kaj 06936 koncernas ambaŭ fenomenojn.

**11895** Diferenco inter

- a) veturrapido kaj radperiferia rapido ĉe adherinterligaj veturiloj,
- b) turnfrekvenco de rotoro kaj rotacia kampo ĉefe de nesinkronaj motoroj,
- c) rapido de polusa rado kaj rotorkampo ĉe trifaza volvaĵo en rotaciaj memstartaj sinkronaj motoroj dum alta rotacifazo,
- d) veturrapido kaj rapido de glitkampo de sinkrona longstatora linearmotoro.

ĉeĥa	<i>skluz</i>	hungara	<i>csúszás</i>
dana	<i>slip mellem slip</i>	itala	<i>slittamento</i>
	<i>(Mellem hjul og skinne)</i>	pola	<i>poślizg</i>
franca	<i>glissement</i>	rumana	<i>alunecare</i>
germana	<i>Schlupf</i>		

La nociopartoj 11895 b), c), d) ne koncernas ruliĝantan radon sur relo. Sekve por tuta 11895 taŭgas la radikoj „turn-“ kaj „rotaci-“. La ĝisnuna Esperanto-termino „glitado“ estas tro ĝenerala.


Du terminproponoj:

- 1) **turnoglitado**
- 2) **rotaciglitado**

PIV klarigas:

**turni 1** Rotacie movi objekton ĉirkaŭ ĝia propra akso.

**rotacii** Turniĝi ĉirkaŭ interna akso.



**06936** Stato, ke traccifortiga aŭ bremsadfortiga rado iomete pli aŭ malpli rapide ruliĝas, kompare kun la rapido de la surrela veturilo.

ĉeĥa	<i>skluz</i>	itala	<i>pseudo-slittamento</i>
dana	<i>hjulslip</i>	pola	<i>poślizg</i>
franca	<i>pseudo-glissement</i>	rumana	<i>alunecare</i>
germana	<i>Mikroschlupf</i>	serba	<i>proklizavanje</i>
hungara	<i>csúszás</i>		

La ĝisnuna Esperanto-termino „pseŭdoglitado“ respondas al la franca kaj itala terminoj. Sen aldonaĵo ĝi estas iom duba.

Du terminproponoj:

- 1) **pseŭdoglitado (de ruliĝantaj radoj)**
- 2) **ruliĝglitado**

PIV klarigas: **pseŭdo-** Prefikso, esprimanta ŝajnecon, falsecon, neaŭtentikecon.  
**ruliĝi 2** Antaŭeniĝi pere de la turniĝado de subportantaj radoj.

**06150** (sen *UIC*-difino)

ĉeĥa	<i>skluz</i>	itala	<i>pattinamento</i>
dana	<i>hjulslip</i>	pola	<i>poślizg (kół napędnych przy rozruchu i podczas jazdy)</i>
	<i>(Ved igangsætning)</i>		
franca	<i>patinage</i>	rumana	<i>patinare</i>
germana	<i>Schleudern</i>	serba	<i>klizanje</i>
hungara	<i>megcsúszás</i>		

Laŭ la ĝisnuna Esperanto-termino „turnoglitado (de trakciradoj)“, dana kaj pola notoj, la nocio koncernas fenomenon I. La terminproponoj respondu al tiuj ĉe 06936.

Du terminproponoj:

- 1) **pseŭdoglitado (de trakciradoj)**
- 2) **ruliĝglitado (de trakciradoj)**

**04288** (sen *UIC*-difino)

ĉeĥa	<i>klouzání</i>	hungara	<i>csúszás</i>
dana	<i>glidning</i>	itala	<i>slittamento</i>
	<i>(Forskel mellem køretøjets translatoriske hastighed og hjulets periferihastighed)</i>	pola	<i>ślizganie się</i>
		rumana	<i>patinare</i>
			<i>(roată blocată, calată)</i>
franca	<i>glissement (roue bloquée)</i>	serba	<i>klizanje blokiranog točka</i>
germana	<i>Schlupf (festgebremstes Rad)</i>		

La nocio koncernas la ekstremon de fenomeno II, ne rotaciantan radon. La ĝisnuna Esperanto-termino „glitado (bremse blokitaĵo)“ ŝajnas sufiĉe taŭga.

**12030** Utiligfaktoro de adherkoefficiento inter rado kaj relo por transmisii trakcifortojn.

ĉeĥa	<i>trakční chování</i>	hungara	<i>tapadási viszony</i>
dana	<i>traktionsydelse</i>	itala	<i>prestazione di trazione</i>
franca	<i>comportement en traction</i>	pola	<i>właściwości trakcyjne</i>
germana	<i>Traktionsverhalten</i>	rumana	<i>comportament de tracțiune</i>

La ĝisnuna Esperanto-termino „trakciadkonduto” tro rilatas al homa ago.

Du terminproponoj:

- 1) **trakciadadhero**
- 2) **trakciadadhereco**

PIV klarigas: **adhero** Forto inter du diversaspecaj substancoj, devenanta de molekula altiro.


**00789** Restadodaŭro de laŭplana alveno de transportilo ĉe intera aŭ fina liniopunkto ĝis laŭplana komenco de retroveturo en tiu punkto, bezonata por ŝanĝi la veturdirekton, eventuale por ŝanĝi veturantan personalon, kompensi malfruiĝon kaj bontenado.

ĉeĥa	<i>dobá obrátu v konečné stanice</i>	itala	<i>tempo di inversione</i>
dana	<i>vendetid</i>	pola	<i>czas zwrotu</i>
franca	<i>temps de retournement</i>	rumana	<i>timp de întoarcere</i>
germana	<i>Wendezeit</i>	serba	<i>prelazno vreme</i>
hungara	<i>csatlakozási idő (a célállomáson)</i>		<i>(na krajnjíj stanicí)</i>

Ĉar la difino enhavas klaran mencion kaj de intera kaj de fina liniopunktoj, la ĝisnuna Esperanto-termino „turnotempo (ĉe finstacio)” ne estas ekzakta. Ni inkludu la procedon laŭ la skizo, se trajno veturas de C al D kun retroveturo en B.

Du terminproponoj:

- 1) **tempo antaŭ retroveturo**
- 2) **turnotempo retrovetura**



PIV klarigas: **turni 2** Fari, ke objekto aŭ estaĵo ŝanĝu sian direkton per ia rotacia movo.

**02279** (sen UIC-difino)

ĉeĥa	<i>dobá oběhu (vozu)</i>	itala	<i>sosta diturno (materiale rotabile)</i>
dana	<i>vendetid</i>	pola	<i>obrót</i>
franca	<i>crochet</i>	rumana	<i>rulaj (vehicule, personal de drum)</i>
germana	<i>Wende</i>	serba	<i>obrť (vozila, osoblja)</i>
hungara	<i>forduló</i>		

La ĝisnuna Esperanto-termino „intervalo retrovetura” ne taŭgas.

Du terminproponoj por diferencigi al 00789:

- 1) **retrovetura procedo**
- 2) **turno retrovetura**

**12055** Tempo por ŝanĝi veturilon inter du trafikiloj, konsistanta el tempopartoj por iri el veturilo, al alia veturilo, en veturilon kaj atendo.

ĉeĥa	<i>přestupní doba</i>	itala	<i>tempo di trasferimento</i>
dana	<i>overgangstid</i>	pola	<i>czas przejścia z jednego pojazdu do drugiego</i>
franca	<i>temps de correspondance</i>		<i>timp de corespondență</i>
germana	<i>Übergangszeit</i>	rumana	
hungara	<i>átzállási időtartam</i>		

La ĝisnuna Esperanto-termino „koneksotempo” ne taŭgas.

Tri terminproponoj:

- 1) **tempo veturilŝanĝa**
- 2) **tempo veturiltransira**
- 3) **tempo trafikilkoresponda**

PIV klarigas: **korespondi 2**

Esti en tia rilato, ke pasaĝero povas uzi ambaŭ veturrimedojn por atingi sian celon.



korespondi 1

## Helpopeto de ĉinaj kolegoj

Nia kara kolego *Li Sen* havas fortan ambicion, en jaro 2011 – okaze de sia 88-jara vivojubileo – fini sian kompilon de nova ĉina-angla-Esperanto-terminaro kun ĉirkaŭ 32800 nocioj. Li petas nin pri koncerna helpo. Pro tio en Triesto kolego *Han Zuwu* disdonis al kunsidantoj *CD-ROM*-diskon kun la ĝisnuna laborrezulto. La dosiero havas sur 819 listo-paĝoj ĉirkaŭ 7800 nociojn en ĉina (eventuale ne legebla), angla kaj Esperanto (parto ZD) kaj ĉirkaŭ 25000 nociojn nur en ĉina kaj angla lingvoj (parto SD). Laŭ enkonduka teksto ni estas petataj pri

- revizio de 365 Esperanto-terminoj en parto ZD kaj
- traduko de 585 terminoj el la angla lingvo en Parto SD.

Sed mankas klara indiko, **kiujn** terminojn ni traktu. Sub ZD pluraj Esperanto-terminoj havas demandosignon. Verŝajne temas pri la 365 reviziendaj. Sub SD antaŭ preskaŭ ĉiu angla termino troviĝas majusklo A, B, C, D, E, F, G, H aŭ J. Klarigo mankas.

Sekve mi petas **ĉinajn kolegojn** pri ekspliko de la helpopeto, eventuale eĉ pri listigo de la 365 (el 7800) kaj 585 (el 25000) traktendaj terminoj, por havi superrigardeblan amplekson.

En nia federacio ne kunlaboras brita landa asocio aŭ specialisto pri anglaj fervojaj fakesprimoj. Sekve ni povas nur serĉi, kiuj anglaj terminoj jam troviĝas en *RailLexic*, kaj nur jesakaze indiki la de ni deciditan Esperanto-version. Ekster tio eblas nur korekti eventualajn tajperarojn.

Mi petas **niajn kunlaborantojn**, kiuj ricevis la ĉinan diskon, pri proponoj, kiel disdoni la kvanton kaj limige plenumi la peton.

Heinz Hoffmann